

“Teo kaj Amo”: Ĉinaj diplomoj por Ĉeĥio

Per la diplomoj “Teo kaj Amo” Ĉina Radio Internacia (CRI) honoras diverslandajn urbojn, kiuj helpas al Esperanta filmproduktado aŭ subtenas homojn, kiuj partoprenas la Filmfestivalon “Teo kaj Amo” en Ĉinio. Al la “urboj de Teo kaj Amo” (Visaginas en Litovio, Bielsko-Biala kaj Białystok en Pollando, urboj Hangzhou kaj Dushan en Ĉinio) ĵus aldoniĝis la ĉeĥaj urboj Svitavy kaj Nový Jičín. La koncernajn diplomojn al ili solene trasdonis Zhang Ping (Ĝoja), raportistino de CRI.

La unua evento okazis en Svitavy. La Esperanta klubo en Svitavy festis sian 85an datrevenon, kaj estis vere bona ideo dum la naskiĝfesto honori la urbodomon kaj urbon Svitavy per Esperanta diplomo. En la naskiĝfesto de la klubo en Svitavy, kiu okazis la 5an de aŭgusto en la Esperanta muzeo, partoprenis multaj honoraj gastoj, reprezentantoj de urbaj institucioj kiel direktorino de urbaj muzeoj Blanka Čuhelová kaj delegito de la urbestro de Svitavy Jiří Petr.

Solenajn bondezirojn persone prezentis eksterlandaj gastoj el Ĉinio, Hungario, Ruslando, Germanio kaj Aŭstrio. Vespere en la Esperanta muzeo okazis koncerto de Anjo Amika el Hungario kaj Jana Muĵeckaja el Ruslando.

Sekvatage multaj partoprenantoj translokiĝis al Bartošovice, kie okazis la 5a Internacia Esperanto-Lernejo (IEL) en kastelo, proksime al la distrikta urbo Nový Jičín. Ĉi-jare okazis Esperanto-kursoj nur en du niveloj. Al la komencantoj instruis Marketa Wilkus el Pollando kaj al la progresintoj Anjo Amika el Hungario.

Al la programo de ambaŭ aranĝoj elstare kontribuis Ĝoja (centre) kaj Jana Muĵeckaja (dekstre), maldekstre estas Li Huang, ĉinino loĝanta en Ĉeĥio. (Foto: Pavol Kaščák)



Ĉiujare ni havas kelkajn surprizojn. Ĉi-jara surprizo estis la juna ruslanda aktorino Jana Muĵeckaja, kiu aktoris en la filmo *Simpla rakonto*, kiu gajnis la ĉefpremion kiel la plej bona filmo de la festivalo “Teo kaj Amo”. Jana jam eklernis Esperanton kaj planas aktori kaj kanti en Esperanto.

Siavice la pekinanino Ĝoja dum la vespera programo en la kastelo ricevis “dolĉan premion” pro la sukcesa organizado de la festivalo. Ŝi akceptis torton en la formo de koro, kaj la partoprenantoj rapide manĝis ĝin.

Kadre de IEL en la urba biblioteko de Nový Jičín okazis vizitado de la fotoekspozicio “Ĉinio – teo kaj amo la duan fojon”. Temas pri ekspozicio de fotoĵoj faritaj dum la filmfestivalo en Ĉinio. Ĝoja profitis la okazon por enmanigi la diplomon “Teo kaj Amo” kaj la libron “Rakonto pri teo” al la vicurbestro de Nový Jičín Pavel Rozbroj. Por ĉiuj kantis Anjo Amika kaj Jana Muĵeckaja kaj teceremonion prezentis Ĝoja. Sekvatage la vicurbestro priskribis en Fejsbuko nian aranĝon kaj esprimis koran dankon pro tio, ke li konatiĝis kun multaj interesaj homoj.

Pavol Kaščák

Jubilea boatado en Kroatio

Komence de aŭgusto la Esperanto-societo de la kroata urbo Sisak sukcese okazigis la dekan jubilean boatadon sur la rivero Kupa. La partoprenantoj dum kvin tagoj traboatis 135 kilometrojn.

- 1.08.2018: Karlovac–Šišljavić, 32 km
- 2.08.2018: Šišljavić–Pokupsko, 34 km
- 3.08.2018: Pokupsko–Letovanić, 33 km
- 4.08.2018: Letovanić–Petrinja, 16 km
- 5.08.2018: Petrinja–Sisak, 20 km

Srećko Radulović

